# Varmigilo - interkonatiĝo

1 **Intervjuu kolegon** kaj skribu ŝian/lian respondon.

NV **Esploru** kun via instruisto la novajn vortojn ĉe paĝo 123.

Persona nomo de la intervjuato .................. familia nomo ............... *karesnomo* .................

Naskiĝ-loko ........................................................................................................

Nacieco ........................................................................................................

*Nuna* adreso ........................................................................................................

*Kiom longe* ŝi/li loĝas en tiu adreso? ............................ ret-adreso ........................................

Urboj, kie ŝi/li loĝis antaŭe ........................................................................................................

Ĉu ŝi/li estas *fraŭla* aŭ edziĝinta? .............................................

Ĉu ŝi/li havas infanojn/ idojn ?   —— jes   —— ne

Nuna okupo ........................................................................................................

Lernejo / universitato ........................................................................................................

*Ŝat*-okupoj (hobioj) ........................................................................................................

Kial ŝi/li lernas Esperanton? ........................................................................................................

........................................................................................................

Kiam ŝi/li  komencis lerni Esperanton? ........................................................................................................

Kiel ŝi/li *esperantumas* nuntempe? ........................................................................................................

Aliaj *fremdaj* lingvoj bone parolataj de ŝi/li ........................................................................................................

Preferata manĝaĵo ........................................................................................................

*Ŝat*-besto plej ŝatata ........................................................................................................

Besto plej malŝatata ........................................................................................................

Plej admirata *heroo* ........................................................................................................

Plej grava *inventaĵo* de la homaro ........................................................................................................

Plej indaj personaj ecoj ........................................................................................................

Plej *evitindaj* personaj *ecoj* ........................................................................................................

Ĉefaj *vivambicioj*, vivoceloj ........................................................................................................

2 Kiam vi finos, **ŝanĝu viajn rolojn** de intervjuanto al intervjuato.

3 Kiam vi ambaŭ finos, trovu liberan kolegon kaj **raportu** al li/ŝi pri la ĵus intervjuita kolego:

— Ĉi tiu estas...   Li / ŝi diris al mi ke ........................................................................................................

**Celoj** de tiu ĉi varmigilo: interkonatiĝo, ekzercado per ki-vortoj; progresigo de parolflueco; ekzercado de raporta parolo: “Ŝi diris, ke... “

**Instruisto**, estas formularo por enir-ekzameno al ĉi tiu instru-nivelo en via ***helpa teko.***

**laŭpaŝe**:

1. Esploru kun la lernantoj la bildojn.

Kiuj estas tiuj homoj? Kion ili faras? Kiu estas tiu homo en la ruĝa aŭtomobilo?

2. Post atenta esplorado de la bildoj, la lernantoj duope ludu nacilingvan dialogon pri ili.

3. Poste la lernantoj aŭskultu la sontekston, sen la skriba teksto.

4. Sekve ili aŭskultu, sekvu silente la skriban tekston.

5. Poste vi esploru kun ili la novajn vortojn.


## Trafika malordo *(revizio de la unua libro)*

Valmor Franca proponas al Margo Lopes veturadon al ŝia banko, sed Margo *konkludas* ke piede ŝi pli rapide *alvenos*.

**1** **Esploru la bildon**. Kio okazas? Kion diras la homoj? **Fermu la libron** kaj aŭskultu la konversaciojn.

53

**2** Ĉu vi *intuicie* komprenis la socian okazaĵon? ***Provu resumi*** nacilingve kion vi aŭdis.




**53** blue, apud la ikono pri aŭdado, estas la numero de la sontrako.

53

**3 Aŭskultu refoje** dum vi sekvas silente la skriban tekston.

**A**

**Val** Margo!
*Margo* O! Val... Saluton. Kiel vi fartas? Pardonu min, *ĉar* mi *hastas*. La banko fermiĝos en dek kvin minutoj.
**Val** Ĉu via banko situas proksime?
*Margo* Jes. Nur tri blokojn antaŭe. Je Privat Strato.
**Val** Bone, envenu do. Mi *veturigos* vin.
*Margo* Ĉu vere? Ĉu vi ne *devojiĝos* pro mi?
**Val** Ne. Tute ne. Via kunesto *plezurigos* min.
*Margo* Vi estas tre ĝentila. Dankon, kara!
Val Ne dankinde.



**B**

*Margo* Bele! Kia bela aŭto!
**Val** Dankon! *Nu* ... Mi kontrolu ... Privat Strato ... Ĉu ĝi situas **en tiu direkto?**
Margo Jes, ĝuste.Turnu la aŭton **dekstren** je la dua stratangulo.
**Val** Ne eblas.Tiu strato estas *unudirekta*.
*Margo* O! Vi *pravas*. Nu, turnu **dekstren** je la sekva *stratangulo*.
**Val** Ni estas en la malĝusta trafiklinio ... Eble mi sukcesos *manovri* ...

**C**

Taksiisto Kion vi faras, idioto?! Ĉu vi *freneziĝis*?!
**Val** Aĥ! La trafiko estas terura hodiaŭ!
*Margo* Nu! Mi kredas ke piede mi pli rapide iros. Permesu min *eliri*. Dankon pro la *provo* helpi min. Ĝis revido, Val!
**Val** Ĝis! Mi *bedaŭras* ke mi ne povis helpi vin.

**Kiel diri.**

Nu! Nu ...
Vi pravas. Prave!
Idioto!
Ĉu vi freneziĝis?
Ĉu vere?
Bele!
Ne! Tute ne!
Tio ne eblas.

NV **Esploru** kun via instruisto la novajn vortojn, ĉe paĝo 123.

## 4 Parola ekzercado

a **Ludu** la dialogon kun via instruisto, laŭ ŝia/lia indiko.
b **Ludu** aktorece la dialogon kun klaskolegoj. **Atentu kaj atentigu** pri klara kaj bela prononco.
c **Aktorado** - Stariĝu. Rolludu duope la dialogon antaŭ la klaso. **Ludu per via tuta korpo**, kiel *lertaj* aktoroj. **Uzu** viajn personajn informojn.

**laŭpaŝe**:

6. Invitu lernanton ludi kun vi, instigante lin/ŝin al ŝajnigo de la sugestita etoso, por aktorece rolludi la dialogojn.

7. Poste vi ludu kun la tuta klaso. Vi ludu unu el la roluloj kaj la klaso ludu la ceterajn.

8. Poste la lernantoj ludu duope, triope kun apudaj kolegoj.

9. Starante, ili aktorece rolludu la tekston antaŭ la klaso.

**Ĉiam aktorece**, rigardante rekte al la partnero.

La numero 9 apud via paĝnumero referencas la paĝon de la porlernanta libro, por faciligi la komunikadon kun viaj lernantoj.

**Instruisto,** esploru sufiksojn **ig** kaj **iĝ**.

## 5 Ĉu vi bone komprenis? **Skribu** ĝuste aŭ malĝuste.

a Margo hastas por iri al dentisto. ( malĝuste )
b La banko de Margo situas je Privat Strato. ( ĝuste )
c Val povas turni la aŭton dekstren. ( malĝuste )
ĉ Margo marŝos ĝis la banko. ( ĝuste )
d Val estas bona *stiristo* ( malĝuste )
e La trafiko fluas tre facile. ( malĝuste )

## 6 Memorigilo el libro unu

Restudu la ***grasigitajn*** esprimojn pri lokiĝo kaj direktoj en la suba dialogo. Ni bezonos ilin por fari ekzercon 7.

**A** Permesu min, sinjoro, ***kie situas*** la banko, bonvolu?
B Ĝi situas ***en tiu direkto, inter*** la kvara kaj la kvina avenuoj, ***proksime al*** la ĉefa bushaltejo.
**A** ***Kiel mi povus atingi ĝin?***
B ***Vi marŝu ĝis*** la stratangulo kaj turniĝu ***maldekstren***. Iru ***rekte*** du blokojn, ***laŭ*** Dua Avenuo kaj turniĝu ***dekstren***. Marŝu tri pliajn blokojn, ***laŭ*** Komerca Strato. La banko situas ***maldekstre***. Ĝi situas ***fronte al*** la homeopatia apoteko, ***inter*** la kvara kaj la kvina avenuoj.
A Kaj, se mi ne *ĝenas* vin, kie situas la poŝtoficejo?
B Vi ne ĝenas. Mi estas helpema. La poŝtoficejo situas ***je*** Dua Avenuo. Ĝi situas **inter** la stratoj Komerca kaj Supra, ***fronte al*** la Okcidenta Parko, ***apud*** la restoracio de LyJuping, ***je*** la angulo de Dua kun Supra.
A Dankon pro via ĝentila helpemo.

## 7 *Paroligilo* pri lokiĝoj kaj direktoj. Studu la mapon en la sekva paĝo.

**Ludu duope.** Imagu ke vi kaj via apuda klaskolego estas tiuj du homoj ĉe la motorciklo. Vi staras ĉe Parko de la Suno, en Suda Strato laŭ la mapo de Universitata Kvartalo. Via situo estas tiu de la bildeto.

**Demandu kaj respondu** al via partnero pri direktoj al la konstruaĵoj listigitaj en la blua kadro.



**Kie situas ...?**

Profesora Hotelo
Barboza Libroj
Centra Biblioteko

**Koncernaj frazaro kaj vortprovizo.**

trafiklumo; trafiklinio;
trafiksignaro;
unu direkta vojo;
densa trafiko;
*ŝoseo; trotuaro;*
rapid-kontrolilo.
Sekvu rekte.
Ne parku.
Ne transpasu.

**Ni studu kune** ĉi tiun mapon, atentante ĉiujn stratojn kaj konstruaĵojn. Kiel *memormetodo*, pasu *fingron* sur la stratoj kaj avenuoj, dum vi diras *duonvoĉe* iliajn nomojn.




**lernotaĵoj:**

revizio de la unua libro

**gramatikaĵoj**

akuzativo pri celo de movo: tien, dekstren, suden, ...

sufiksoj
**ig, iĝ**

**temoj**:
Ampleksigo de vort-provizo.

**celoj**:
plifirmigi ĵusajn kaj antaŭajn lernitaĵojn.

paroligi ĉiun lernanton individue, por akceligo de parolflueco.

**Instruisto**, la nomoj de la stratoj referencas la pioniroj de Esperanto. Se via disponebla tempo tion ebligas, jen bona ŝanco por montri iom de la historio de Esperanto.

Ĉu nutraĵo... ?


**Instruisto**, disdividu la skribtabulon je tri kategoriojn, nome nutraĵoj, frandaĵoj kaj trinkaĵoj.


La lernantoj proponu aldonojn al la listoj.

**Paroligilo** - Ĉu *nutraĵo, frandaĵo* aŭ *trinkaĵo?*

Rigardu la bildojn kaj la liston de nutraĵoj, frandaĵoj aŭ trinkaĵoj.

*1 ovoj kun lardo, 2 fiŝaĵo, 3 ŝorbeto, 4 suko, 5 sandviĉo, 6 pico, 7 bombonoj, 8 papriko, 9 biero.*






**Ludu triope**. Imagu ke vi kaj viaj du kolegoj estas en kafejo. **Proponu** al ili ion por manĝi aŭ trinki. **Faru** demandojn kiel:

Ĉu vi akceptas ................................ ?
Kion vi opinias pri ............................ ?

**A** Ĉu vi konas pekion?
B Ne. Kio ĝi estas? Kia estas ĝia gusto?
**A** Ĝi estas frukto tre bongusta. Jen. Gustumu.
B Aĥg!! Ĝi estas tro *amara!*

**gustoj** - amara, dolĉa, dolĉamara, *stranggusta acida*, dolĉacida, *arda*, sensala, *grasa*, tro *spica*...,

**koncernaj verboj**: ŝati, malŝati, sata, satigi, soifi.

**Ludu grupe.** Proponu al via instruisto **listigi** kelkajn nutraĵojn, frandaĵojn aŭ trinkaĵojn kies gustoj estas:

| arda | acida | amara | stranggusta |
|---|---|---|---|
| .............................. | .............................. | .............................. | .............................. |
| .............................. | .............................. | .............................. | .............................. |
| .............................. | .............................. | .............................. | .............................. |
| .............................. | .............................. | .............................. | .............................. |

***Rimarko pri paroligilo 2***

*En kelkaj naciaj kulturoj estas normale interhoma tuŝado, brakumado kaj vanga kisetado.*

*En kelkaj aliaj kulturoj tio ne estas permesata.*

*Laŭ via decido, la lernantoj faru aŭ ne tiun ĉi ekzercon.*

## Revizio pri pronomo si

**Paroligilo** - Enklasa *kisado*

**Ludu kvarope** - Du lernantoj aktoru *vangan* kisadon, dum du aliaj lernantoj, starantaj antaŭ la roluloj, demandas kaj respondas inter si, per montraj gestoj:

-- Ĉu li kisis ŝin? -- Ĉu ŝi kisis lin? -- Ĉu li kisis **sin**? -- Ĉu ŝi kisis **sin**? -- Ĉu ili kisis **sin**?
-- Ĉu ili kisis unu la alian?

**Ludu sesope** - Du lernantoj kisas la vangon **al du aliaj lernantoj**. Du observantoj demandas kaj respondas inter si, per montraj gestoj:

-- Ĉu ili kisis ilin? -- Ĉu ili kisis unu la alian? -- Ĉu ili kisis **sin**? ktp.

**Petu** de via instruisto *apartan* folion pri revizio de gramatikaĵoj, el ŝia/lia helpa teko.

NV **Esploru** kun via instruisto la novajn vortojn ĉe paĝo 124.

**instruisto**, printu por disdoni ekzercon pri gramatikaĵoj de paĝoj 1,2 de via helpa teko 2.
(www.lernejajklasoj.info)

# laŭpaĝa vortlisto



Lernanto, notu laŭ via kompreno la klarigojn de via instruisto. Memoru konsulti vortaron por pli bone kompreni la vortojn. Tiel vi konstruos mem vian propran vortaron.
La afiksoj aperas **pli nigre** por ke vi facile identigu la konsistigajn partojn de la vortoj.

paĝo 7

ambicio ....................
dungi ....................
**ec**o ....................
eviti, evit**ind**a....................
fraŭlo ....................
fremda ....................
heroo ....................
invent**aĵ**o ....................
karesi, kares·nomo ....................
longa ....................
nuna ....................
ŝati, ŝat·besto, ŝat·okupo ....................

paĝoj 8 ĝis 11

angulo, strat·angulo ....................
bedaŭri ....................
ĉar ....................
direkto, unu·direkta ....................
frenez**iĝ**i ....................
ĝeni ....................
graso, gras**ig**ita ....................
hasti ....................
intuicio ....................
lerta ....................
memoro, memor·metodo ....................
manovri ....................
partnero ....................
plezur**igi** ....................
pravi ....................
provo ....................
resumi ....................
stiri ....................
vetur**igi** ....................
vojo, de·voj**iĝ**i ....................

paĝo 12

acida ...
amara ...
aparta ...
arda ...
biero ...
bombono ...
dolĉa ...
fiŝo, fiŝ**aĵ**o ...
frandi, frand**aĵ**o ...
kiso ...
lardo ...
nutri, nutr**aĵ**o ...
papriko ...
pico ...
sandviĉo ...
spico ...
stranga ...
ŝorbeto ...
trinki ...
vango ...